Mu Du,

Rigardo sur Nanjingon

tradukita de Manfred Retzlaff

Papava kamp' en verdo lulas sin.
Malsupre la rivero fluas.
La kanto de la merloj ravas min.
Ĉe la dekliv' vilaĝ' situas.

Sagao-riĉaj temploj kiel or'
briletas jen en suna lumo,
kaj la tegmentoj altaj en la for'
disfluas en vespera fumo.

Traduko de la ĉina poemo "Jiāngnán Chūn" de Mu Du *(Du Mu, ∗803 – †852) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-938-1884 (2013-11-22 19:33:51)

Mu Du,

Jiāngnán Chūn

Qiān lǐ yīng tí lù yìng hóng
Shuǐ cūn shān guō jiǔ qí fēng.
Nán cháo sì bǎi bā shí sì
Duōshao lóu tái yān yǔ zhōng.

Verkinto de tiu ĉi ĉina poemo estas Mu Du *(Du Mu, ∗803 – †852).*

Arg-938-1880 (2013-11-22 19:14:52)

Vidu ankaŭ: http://www.mountainsongs.net/poem_.php?id=839.